

ĈIELENIRO – 1an de junio 2014

ESTAS DONITA AL MI ĈIA POTENCO EN LA ĈIELO KAJ SUR LA TERO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 28,16-20

En tiu tempo la dek unu disĉiploj iris en Galileon, sur la monton, kiun Jesuo antaŭe indikis al ili.

Kiam ili vidis Lin, ili adorkliniĝis, kelkaj tamen hezitis kredi. Jesuo alproksimiĝis kaj diris: "Estas donita al Mi ĉia potenco en la ĉielo kaj sur la tero. Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disĉiploj, baptante ilin en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito, kaj instruu ilin observi ĉion, kion Mi ordonis al vi. Kaj sciu, ke Mi estos kun vi ĉiam, ĝis la fino de la mondo".

Povas ŝajni iom strange ke ĝuste dum la festo de la ĉieleniro la liturgio prezentas al ni iun evangelion en kiu ĝi ne aperas. La ĉieleniro estas rakontata en la evangelio de Luko, en tiu de Marko, sed ne en tiu de Mateo. Nu la peco estas ĝuste de Mateo, sed kial ĉi tiu?

Ĉar la ĉieleniro ne estas disiĝo de Jesuo disde la homaro, sed eĉ pli intensa proksimeco, ne estas foresto, sed ĉeesto eĉ pli vigla kaj partoprenata. Sed ni vidu la evangelion. Ĝi estas la ĉapitro 28 de Mateo, ekde la versiklo 16. Estas la lastaj versikloj de la evangelio de Mateo, la fina parto.

"La dek unu disĉiploj", mankas Judaso. Li fakte faris sian elekton. Jesuo diris: "Vi ne povas servi kaj Dion kaj la monon", li elektis la monon, kiu, kiel ĉiuj falsaj idoloj, detruas tiun kiu ĝin amas. Do Judaso ne ĉeestas. "Iris en Galileon, sur la monton, kiun Jesuo antaŭe indikis al ili".

Jen tio estas sufiĉe stranga. Veras ke tri fojojn estis la indiko ke Jesuo estos videbla en Galileo; ne en Jerusalemo. Jesuo releviĝinta neniam aperas en tiu malbonaŭgura urbo, loko de la religia institucio, signo de morto. La vivo estas neakordigebla kun la morto.

Kaj tri fojojn estas la invito iri al Galileo, sed en neniu el tiuj invitoj estis precizigita la loko. Male ĉi tie la dek unu iras certaj pri la trafo, "*sur la monton*", ne unu el la pluraj montoj kiuj konsistigis Galileon, sed "*la monton, kiun Jesuo antaŭe indikis al ili*".

Kiu estas tiu monto? La esprimo 'la monto' aperis en la komenco de la evangelio, en la ĉapitro 5, por indiki la monton de la beatecoj, kie Jesuo anoncis sian mesaĝon. La beatecoj estis ok ĉar ok estas la nombro de la releviĝo – Jesuo releviĝis la unuan tagon post la semajno – kaj la nombro ok indikas la vivplenecon kapablan superi la morton.

Kun Jesuo la morto ne nur ne interrompas la vivon, sed permesas al ĝi liberigi ĝiajn tutajn energiojn kaj ekflori sub nova formo, plena kaj difinitiva. Pro tio la dek unu iras sur la monton kiu estas la monto de la beatecoj. Kion volas diri la evangeliisto? Ke la sperto de Kristo releviĝinta ne estis privilegio allasita antaŭ dumil jaroj al grupo da personoj, sed ebleco por ĉiuj kredantoj. Sufiĉas akcepti la mesaĝon de Jesuo, praktiki la beatecojn kaj inter tiuj estas ĝuste tiu kiu diris "beataj la kore puraj ĉar ili vidas Dion".

Fakte la evangeliisto skribas: "*Kiam ili vidis Lin*, "kio ne rilatas al la fizika vido, sed al la interna vido, tiu de la fido, "*ili adorkliniĝis*". Ili do vidas Jesuon releviĝinta, adorkliniĝas, tio estas rekonas en li la dian kondiĉon. Sed estas iu strangaĵo, "*kelkaj tamen hezitis kredi*".

Sed pri kio ili dubas? Ne pri lia releviĝo, ĉar lin ili vidas. Ne pri la fakto ke Jesuo havas la dian kondiĉon, ĉar ili adorkliniĝas. Pri kio ili dubas? Tiu verbo 'dubi' aperas nur du fojojn en tiu ĉi evangelio kaj la unua fojo estis en la ĉapitro 14, versiklo 31, kiam Petro volis iri sur la maro, sur la akvoj, ago kiu signifis havi la dian kondiĉon. Sed, tre baldaŭ, li komencis droni ĉar li teruriĝis pro la vento.

Li pensis ke la dia kondiĉo venas de iu privilegio allasita de la alto kaj ne pro iu sindevigo flanke de la homo alfronti la kontraŭecojn. Nu kiam li estas drononta, Jesuo lin riproĉas "*Homo kun malmulte da fido kial vi dubis?*" Do ĉi tie pri kio dubas tiuj ĉi disĉiploj? Ili dubas pri sia kapablo ankaŭ mem atingi la dian kondiĉon, ĉar ili vidis kiom tio kostas: la hontaĵo de la perfido, de la forlaso kaj de la kruco.

Estas ili kiuj, kiam dum la lasta vespermanĝo kune kun Petro ili certigis Jesuon ke ili neniam lin malkonfesos, male, tuj kiam Jesuo estas

arestita, ĉiuj lin forlasis. Pro tio ili dubas, esti kapablaj toleri tion kion Jesuo toleris, tio estas la forlaso, la perfido kaj la hontaĵo de la kruco.

Jesuo alproksimiĝas al ili kaj diras ke estis donita al li ĉiu povo en la ĉielo kaj sur la tero, tio estas la plenecon de la dia kondiĉo, kaj poste li ilin sendas. La rilato kun Jesuo estas dinamika rilato. La amo de Dio ne centriĝas sur sin mem, sed volas disetendiĝi. Li ilin sendas igi disĉiplojn ĉiujn popolojn, la paganajn naciojn. Kaj kiel? Komence de la evangelio Jesuo, kiam li vokis la disĉiplojn, diris: "Venu malantaŭ mi kaj mi igos vin fiŝkaptistoj de homoj".

Tio estas, temis pri forigo de la homoj el la mortiga elemento, la akvo, por ilin porti en tiun kiu donados al ili la vivon. Nun Jesuo diras kie kaj kiel. Kie? En la tuta homaro. La laborkampo de la disĉiploj de Jesuo estas la tuta homaro. Kiel? Ilin baptante. La verbo 'bapti' ne havas la liturgian signifon kiun poste alprenos la verbo bapti, kiu signifas 'enmergi'.

"Baptante ilin en la nomo" tio estas en la realo, *"de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito"*. La nombro tri indikas la plenecon, kaj ĉi tie ĝi volas indiki la trioblan realecon de la dia kondiĉo, tio estas senkondiĉa kaj senlima amo. Estus kiel diri: Iru kaj ĉiun personon enmergu en, impregnu per tiu amo".

"Instruu ilin" kaj estas la ununura fojo en kiu Jesuo rajtigas siajn disĉiplojn instrui, *"observi"* laŭlitere "praktiki", *"ĉion, kion Mi ordonis al vi"*. Kaj la ununura afero kiun Jesuo ordonis en tiu ĉi evangelio, en kiu aperas la vorto 'ordono', estas la beatecoj. La praktikado de la beatecoj signifas orienti propran vivon al la bono de la aliaj. Tio ne povas esti instruata per iu doktrino, sed pere de komunikoj kaj vivospertoj.

Nu, se tio estas, jen la certigo de Jesuo *"Mi estos kun vi"*, fakte komence de la evangelio Mateo prezentis Jesuon kiel "la Dion kun ni", iun Dion ne serĉenda, sed akceptenda, por kun li kaj kiel li iri al la homaro. *"Mi estos kun vi ĉiam, ĝis..."* kaj pli ĝuste ne temas pri la fino de la mondo sed *"... la fino de la tempo"*.

Jesuo ne estas donanta tempolimon sed ĉeesto-kavliton. Jen do, revenante al la temo de la releviĝo, kiu ne estas disiĝo de Jesuo disde la homaro, sed ĉeesto eĉ pli intensa. Ĝi ne estas foreco, sed daŭra proksimeco, kreskanta, ĉiun tagon.